

## Zsófia KÓRÓDY

Naskiĝis en Hungario. Parolataj lingvoj: la hungara (gepatre), angla, E-o, germana, rusa (baza).

Inter 1975 kaj 1980 studis en la Universitato ELTE (Budapeŝto) en la fakoj angla, hungara kaj

E-o. Estas diplomita instruistino pri tiuj 3 lingvoj.

1980-87: dungito de HEA (respondeca pri instruado kaj ekzamenado).

1980-81: partatempa instruistino de E-o en bazgrada lernejo.

1987-2003: instruistino pri la angla kaj E-o en Nemeth Laszlo-Gimnazio.

1989-97: instruistino de la angla en la Budapeŝta Teknika Universitato.

1994-98: partatempa dungito de la Akademio de Belartoj: instruistino de la angla kaj respondeculo pri internaciaj kontaktoj.

1995-2006: mentoro pri instrupraktiko: en sia mezlernejo ŝi gvidis kaj superrigardis la instrupraktikon de la studentoj el 3 budapeŝtaj universitatoj.

E-aktiveco: gvidis/as lingvokursojn, ankaŭ rekt-metode, organizis tendarojn, konferencojn (ekz. ILEI-Konferenco en 1981), landajn Erenkontiĝojn.

Iamaj/nunaj titoloj, funkcioj: vicprezidanto de HEJ (Hungara E-Junularo),

komitatano de TEJO, vicprezidanto de TEJO, helpantoorganizanto de TEJO- kaj

UEA-kongresoj en Hungario en 1983, estrarano de HEA, gvidanto de Instru- kaj

Ekzamenkomisiono de HEA, rajtigita ekzamenanto de IEK, ekstera kunlaboranto respondeca pri E-instruado ĉe la

Hungara Edukministerio, ekzamenanto por E-o ĉe la hungara ŝtata

lingvoekzamenkomisiono (ITK), honorofica kunlaboranto/instruisto por

Interkultura Centro en Herzberg, komisiito de GEA por instruado.

Ekde 2006 estro de la germana ILEI-sekcio.

Publikaĵoj: artikoloj en E-gazetoj, Gramatika Ekzercaro (eldonis: Hungara

E-Asocio, Bp. 1987. – 105 p.), kunlaboranto de Hungara–Esperanta Meza

Vortaro (HEA, 1996).

(el Panteono de [www.edukado.net](http://www.edukado.net))

En 2015 Zsófia KÓRÓDY fariĝis Honora Membro de ILEI.